

Núm. 5

MAYO 1949

Ruzafa, 7
VALENCIA
(ESPAÑA)

¡EL REMEDIO YA EXISTIA!

El gran público no se ha dado cabal cuenta de la enorme trascendencia que tiene la decisión, hace poco tomada por varios estados, de formar un organismo superestatal. Aunque las alianzas entre estados no son cosa nueva, y hasta en muchas ocasiones son perniciosas, este nuevo acercamiento internacional está llamado a tener importantísimas derivaciones para el futuro.

En el siglo pasado, los ensayos de conveniencia internacional, como el Zollverein de los estados alemanes, hasta entonces independientes y a veces hostiles entre sí, sólo podía conducir, dada la falta de preparación política de las masas, a la formación de un estado único, con idioma único, religión única, ejército único y, como consecuencia, un ideal racial expansivo y dominador: el pangermanismo.

El estado de espantosa quiebra económica de la actual postguerra ha hecho meditar profundamente a los gobernantes de muchos estados, que han venido a deducir que tan sólo la íntima colaboración de varios estados, hasta entonces recelosamente aislacionistas, podía paliar los efectos de la inmensa hecatombe financiera. Y así nació el conglomerado del Benelux, y poco después el acuerdo aduanero franco-italiano con beneficio inmediato para sus habitantes.

Este es el primer paso para llegar a lo que se ha dado en llamar «economía dirigida», y, aunque su trascendencia tangible no ha de comprobarse inmediatamente, el éxito de su realización está asegurado porque, a pesar del viento de fronda que sopla de frontera en frontera, la necesidad vital de subsistir obliga al acercamiento administrativo internacional; lógicamente se tiene que pasar después al acercamiento político y militar; no será cuestión de meses, o de pocos años, pero el primer paso está dado, y eso es lo esencial; lo demás ya vendrá...

Particularmente valioso para este acercamiento ha sido la existencia del movimiento europeo llamado «Federación Mundial», al que están adscritos muchísimos eminentes políticos de varias naciones. Entre ellos hay muchos esperantistas y partidarios del Esperanto. Bien conocida es la fracción esperantista denominada «Universala Ligo», que propugna la formación de un Gobierno Mundial, superestatal, que, respetando la esencia, idioma, religión e intereseses peculiares de cada estado, procure dirigir los intereses comunes a todos, con miras a la lógica en la producción y distribución de alimentos y materias primas. Desde luego, entre los medios de relación internacional, la U. L., con un criterio lógico y práctico, ofrece, como único remedio para la mutua comprensión, el uso del Esperanto. Sólo así podría efectuarse en condiciones de paridad y economía, el trabajo del nuevo organismo, ya que el poliglotismo de la O. N. U. sirve de amarga experiencia.

Día llegará en que desaparezca el recelo y la desconfianza; en que no existirán las barreras aduaneras; en que se pueda pasar de un país a otro sin tener que esperar a encanecer; en que haya una moneda internacional y en que se pueda almorzar en Madrid, comer en Londres, merendar en Berlín y cenar, en Roma.

Por eso, al leer la importante determinación internacional que hemos citado, nos ha producido la grata impresión de que ha comenzado la era en que, hasta los más escépticos comenzarán a necesitar irremisiblemente ese lenguaje maravilloso, instrumento de paz y cultura, que es el Esperanto.

ESPERANTO NE ESTAS FREMDA LINGVO, NEK STRANGA LINGVO, SED LINGVO TIEL PROPRA, KIEL LA PROPRA LINGVO!

INSULO DE PACO

Mirindaj teknikaj progresoj alproksimigas la landojn kaj ebligas la homaron al intima interfratiĝo. Antaŭ nur unu jarcento tiuj, kiuj havis parencojn en Ameriko konsideris ilin kvazaŭ duonmortintojn; kaj, fakte. kiam io okazis al ili, la sciigo trafis Eŭropon kiam la okazintaĵo ŝanĝiĝis aŭ perdis efican aktualecon. Ni povas, nun, aŭdi ilin, kaj, post kelkaj jaroj, ni povos, ne nur aŭdi ilian paroladon, sed eĉ vidi ilin samtempe. Mirindaj avantaĝoj de la scienco!

Sed, ne ĉiuj branĉoj de la homa spirito progresas samtempe nek samrapide. Ni kredas ke, sen eraro, kelkaj el ili eĉ stagnis, de antaŭ multaj jarcentoj. Se la nuna homo rajtas primoki la pasintecan kavernulon —sub teknika vidpunkto—, li tute ne rajtas fieri pri evoluo de la spirito al la tuteca moralo; certe li perdus, post objektiva kaj detala komparado.

La iamaj leĝoj de lukto por la vivo, memvolo, alproprigo, k. t. p., regas en tuta vigleco. Oni ne bezonas tro forte «ungograti» afablan ĝentlemanon por trovi, en lia tuta esenco, la sovaĝan kavernulon, timinda pro sia krueleco. Tio, kio estas facile videbla individue, estas multe pli trovebla kaj okulfrape pli terura ĉe amasoj kaj nacioj.

Sekve, multaj teknikaj progresoj, anstataŭ efiki por plibonigi la vivon, malutilas la homaron.

Tial, ĉia tendenco al homa interfratiĝo, al reciproka helpo trans limoj kaj naciaj baroj, estas laŭdinda, ĉar oni celas al restarigo de la perdita ekvilibro inter la scienco kaj la moralo; grava minaco je terura pereo por la homaro.

Esperanto, kiel perfekta ligilo inter diversnacianoj, estas grava rimedo por atingi la perditan ekvilibron; ĝia ĉefa avantaĝo estas la neŭtraleco, kiu ebligas akcepton de ĉiuj religiaj, politikaj kaj sociaj tendencoj.

Kvankam ni ne falas en la naivecon kredi, ke esperantismo estas ja la universala panaceo, ni konscias ke ĝi estas forta —fortega— armilo, kontraŭ la ĉefaj malbenoj kiuj nun vipas la homaron: perforto kaj netoleremo.

Diri esperantisto estas ja multe. Tio estas homo toleremа, helpema, gastama; kaj, se iu esperantisto ne estas tia, li ne rajtas garni sin per tiu nomo. Esperantujo estas en la nuna ŝtorma maro de la vivo, verda insulo de paco kaj amo konstanta en florado!

GAPANTE....

Ĉiuj plenkreskuloj amuziĝis plurfoje vidante la bildon, kiu montras bubojn starantajn antaŭ la montrofenestro de bombonejo, elsuĉante siajn fingrojn anstataŭ la deziratajn dolĉaĵojn.

Tiu bildo ripetiĝas de antaŭ jarcentoj, en la realeco, ne nur antaŭ dolĉaĵoj, sed bedaŭrinde, antaŭ butikoj kie oni vendas multe pli necesajn varojn ol ĉe bombonejoj.

Mulfoje, ni, hispanaj samideanoj, aspektas tute simile al tiuj buboj. Ni ne suĉas niajn fingrojn, sed ni gapas kiel kamparanoj, kiuj vidas unuafoje grandan urbon, kiam ni ricevas propagandon por Universala Kongreso aŭ renkontiĝoj en eksterlanda kaj samideana medio. Ni ne suĉas niajn fingrojn, nia salivo ne defluas teren, sed mankas malmulte...

Ni kuŝas tiom malproksime de la kongresurboj; niaj pasportoj estas tiom neatingeblaj; devizoj flugas tiom alten; niaj poŝoj estas tiom malplenaj! Fakte, ni havas la impreson ke ni loĝas en alia kontinento, eĉ en alia mondo...

Por hispana samideano, ricevi revuon aŭ leteron de korespondanto estas nekomparebla frandaĵo, ĉar ĝi estas la preskaŭ unika samideana nutraĵo, kiu subtenas lian esperantismon.

Nia anguleca situo en Eŭropo, ekster la kutima kruciĝo de komercaj aŭ turismaj vojaĝantoj, preskaŭ apartigas nin de la ebleco esti vizitataj de eksterlandaj samideanoj. Oni rememoras, kiel benitajn datojn, tiujn, kiam la Majstro vizitis nin, kaj, multe da jaroj poste, kiam Kongreso okazis en Valencio. De tiam, ni vivas nur rememorante... Tial, kiam ni ricevas kongresan propagandon, ni gapas, gapas...

EL ESPERANTO, LENGUA ARTIFICIAL

Por R. HERRERO

Con harta frecuencia escuchamos de labios de personas, más o menos autorizadas en materia lingüística, el juicio, poco favorable a la lengua auxiliar, tachándola de «algo artificial, sin vida, poco apto para expresar con exactitud los matices de la emoción y de las pasiones humanas».

Aunque siempre hemos negado beligerancia para opinar sobre el Esperanto a todos los que no lo conozcan a fondo, por muy filólogos que sean, no podemos silenciar el reciente juicio crítico del Dr. Torres Bodet. Presidente de U.N.E.S.C.O., el cual, al hablar, hace poco, en Bruselas, repitió, poco más o menos, los mismos juicios, arriba expresados, y que denotan el mismo desconocimiento de la materia enjuiciada.

La artificiosidad del Esperanto es cosa muy relativa y discutible. Los idiomas naturales, que expresan los más diversos matices de la emoción y de las pasiones, son el producto artificioso, no sólo de la tradición ciega e ilógica, que adopta palabras cuya legitimidad no tiene otra credencial que el uso inveterado, sino también del artificio elaborado por las Academias, que limpian, fijan y dan más o menos esplendor al lenguaje espontáneamente basto de las masas. Esa artificiosidad llega, en ocasiones, a un nivel de atrevimiento que debe escandalizar a cualquier persona sensible, como es, sin duda alguna, el Sr. Torres Modet. Ese caso es el del idioma oficial de los Países Bajos.

Un tanto preocupados andaban los bátavos por la dificultad gramatical de su idioma, a la que pocos extranjeros se atrevían a desafiar; mucho más complicado que el alemán, que ya es nombrar una respetable suma de dificultades. Pues bien: después de un concienzudo estudio y del consiguiente trabajo de simplificación, limpieza y modernización, el nuevo idioma, hijo aventajado del anterior, le sustituye en toda la línea, borrando definitivamente al antiguo, que aunque campeaba hasta hace pocos años, resulta ahora arcáico.

Y resulta que el Sr. Torres Bodet tiene la ocurrencia de decir que los idiomas «artificiales» no sirven para matizar... etc., etc., en Bruselas, esto es, en una ciudad en donde dos tercios de la población habla esa lengua «artificial», que les sirve para sus emociones, pasiones, etc., pero que se van a poner muy tristes en cuanto se enteren, por la conferencia del Sr. Torres, de que, por hablar en idioma artificial, no podrán en adelante reir, llorar, solazarse ni ganar dinero... ¡Pobre gente!

Si estudiamos desapasionadamente el aspecto artificial de los idiomas, hemos de comprender que todos lo son, en mayor o menor grado. Desde la onomatopeya hasta la importación en masa de un idioma completo para injertarlo en otro (El francés en el inglés, por obra de los normandos), y todo ello hecho sin reglas, leyes, sentido común ni filológico, todo ello no es más que un artificio, y no pequeño. No lo parecerá, a primera vista, porque su verificación ha sido lenta y progresiva, pero no por eso dejará de ser tan artificial como si se hubiese hecho de golpe y porrazo, y no por eso será más racional. No cabe la menor duda de que es mucho más lógica la reforma brutal, pero científica, del holandés, que la lenta pero ciega, del inglés.

Y si todo ello es así, ¿no será mil veces preferible un idioma que prescinda desde el principio de incongruencias, irregularidades y dificultades lógicamente corregibles? ¿Por qué para un idioma se tiene que guardar diferente norma que para las demás cosas de la vida?

Si se nos presenta en una tienda cualquiera un artefacto que, siendo barato y de fácil entretenimiento, sencillo de manejar y sin posibles averías, nos aproveche para iluminar la casa durante la noche, limpiarla durante el día, lavar la ropa y cocinar sin humos ni ruidos, ¿acaso nos pararemos en objetar que no nos sirve porque es artificial? ¿Será mejor el jumento que el ferrocarril, por ser más natural? ¿No son acaso el avión, el vapor, el teléfono, etc., utilizados por el Sr. Torres, productos «artificiales» y relativamente «revolucionarios», ya que no han esperado siglos enteros en «evolucionar», según los cánones de la asimilación lenta y tradicional?

¡Vamos, Sr. Bodet! ¡Enjuiciemos seriamente la cosa, no hagamos literatura sobre este asunto y convengamos en que la artificiosidad del Esperanto es un «slogan» sobre el cual no debe insistir una personalidad solvente en la materia!

El Esperanto es una lengua viva desde su iniciación porque ese fué el deseo de su creador, y ese fué el principal motivo de su triunfo inicial, ya que a todos, y especialmente a los latinos, les suena a lengua familiar; la etimología del idioma de Zamenhof es la de los idiomas que tienen actualmente, o han tenido antaño, vida propia. No es, pues, justo, hablar de artificio con respecto al Esperanto, como se podría hablar del Volapuk o del Idioma Internacional de nuestro compatriota Sotos Ochando, que estaban basados exclusivamente en apriorísticas consideraciones.

Además, después de más de sesenta años de vida floreciente en todos los ramos de la Literatura, de tener miles de obras originales y traducidas; cuando los más destacados literatos de todos los tiempos y países han encontrado en el Esperanto el medio más apropiado para traducir las emociones y las pasiones de sus obras maestras, resulta un tanto ridículo que un Señor X o Z, así sea el Oráculo de la Academia de la Lengua, emita campanudamente unos juicios acerca del Esperanto, que son absolutamente vácuos... por desconocimiento de la materia juzgada.

INTER LA PROZO DE LA ESPERANTISTA GAZETARO

Daŭris la legado kaj daŭris la ĝuo frandi la diversnaciajn nuancojn de unu sama nobla sento, tra la variaj paĝoj de nia internacia gazetaro. Tre gaje petolas unuavice la sveda amiko MALGRANDA REVUO, belaspekta broŝuro 32-paĝa, kiu aperas kvaronjare; serioza kaj tamen facila kaj agrabla estas la enhavo; interesan studon prezentas palestina samideano pri la Druzoj el Supra Galileo, arablingve paralonta gento, kiu restas ĝis nun misterplena enigmo, kies etnologia deveno, moroj kaj religio ne estas definitive esploritaj. En artikolo pri la nuntempa germana vivo aperas la versaĵo «Voko al la mondo de la berlinaj esperantistoj», kiel specimenon, vidu la unuan strofon:

La tuta ter' rigardas al Berlino,
La tranĉopunkto de la vasta mondo,
Gi ŝajnas esti kvazaŭ je la fino,
Kaj tamen estas forta paca ponto.

Salutinda estas la reapero de la SCIENCA REVUO, kiu antaŭ la milito tiel digne reprezentis nian movadon sur la kampo de la sciencoj. En la enkonduko oni legas: «En nia moderna socio, la sciencoj ludas ĉiam pli gravan rolon. La sciencistoj estas multrilate la gvidantoj de la homa socio. La scienco estas esence internacia, sed la diverseco de lingvoj estas forta baro por la libera kaj natura evoluado de la sciencoj. Ni, esperantistaj sciencistoj, havas potencan rimedon por venki ĉi-tiun baron, sed ni devas konvinki kolegojn pri la grandaj avantaĝoj de Esperanto». En alia artikolo oni diras: «Kiam oni skribas pri matematiko aŭ fiziko en esperantaj revuoj, oni kelkfoje ne povas eviti la uzon de malpli simplaj formuloj kaj literoj el diversaj alfabetoj. Pri la literoj mi volas rimarkigi ke oni ne devas timi uzi la neesperantajn literojn Q, W, X kaj Y.» Sed por la nomoj de tiuj literoj estas du proponoj: kvo, ŭo, kso kaj ipsilono, aŭ: kuo vovo, ikso kaj igreko. Gis definitiva solvo, ni notu en niaj kajeroj ambaŭ formojn. Oportune estas nun memori, ke en aktuala raporto de Heroldo, oni uzas tute trafe la vorton VEJTO por traduki tiun, kiun hispane oni nomas VETO. Mi kredas, ke pli ol unu leganto, pli ol unu fojon, cerbumis por trovi ĝustan formon al tiu jukanta vorteto. Ankaŭ kelkaj naciaj gazetoj meritas specialan atenton por la hispana samideanaro: FRANCA ESPERANTISTO dediĉas afablan saluton al nia Bulteno; la ekstera aspekto estas loga, kaj la enhavo agrabla kaj distra; la multe konata ŝercema poeto Raymond Schwartz pikeme humorumas pri tiklaj aktualaĵoj; sub titolo «Aspektoj de nia gazetaro», estas rubriko tre simila al tiu-ĉi mem, kiun mi spicas. Kvazaŭ malvarmeta venteto, dum tago sufoka en somero, nin salutas INFORMILO de Portugala Esperanto-Ligo. Sen ia emfazo estu dirite, ke portugaloj kaj hispanoj estas pli ol najbaroj; ĉar, kunloĝantoj de sama domo, estas egale interesaj por ili ambaŭ eĉ plej etaj detaloj de la komuna hejmo. Niaj portugalaj fratoj klopodas nun por leĝe starigi sian ligon; kaj ili sin turnas al ni per kortuŝaj vortoj por efika kaj intima kunlaboro, kiun, kompreneble, neniel ni povas nek devas neadi. Estu ili certaj, ke iliaj deziroj estas niaj, same kiel, se necese, ankaŭ la klopodoj por plej bona sukceso.

De la lando de la sfinkso venas LA EGIPTA ESPERANTISTO, sola reprezentanto de nia gazetaro en la araba familio. La hispana historio estas forte ligita kun la historio de la araba popolo; kaj multe pli grava, ol tiu historio de longaj militoj, estas la pozitiva influo de la agoj de kulturo kaj laboro, dum ne malpli longaj periodoj de paco. Tra la tuta Hispanio, nomoj de urboj kaj vilaĝoj, riveroj kaj montoj, atestas pri la postsignoj kiujn la araboj lasis; en la sudo, precipe, mirindaj konstruoj ne nur estas historiaj rememoraĵoj de la araba regado, sed treege valoraj juveloj por la bela Andaluzio, kiu ankoraŭ en siaj kantoj kaj en siaj dancoj montras la trajtojn de sia araba deveno. La egiptaj samideanoj dediĉas al ni afablajn kaj ĝentilajn vortojn en

sia gazeto. Kelkaj artikoloj havas apudan tradukon en araba lingvo; interesa estas tiu sub titolo «Esperanto kaj Spiritualismo». Tiu juna gazeto estu kuriero do de nia afero en ĉiuj ceteraj arabaj landoj, kie virga tereno atendas la semon de nia kara ideo por doni belegajn fruktojn. Melankolie, mi pensas nun pri Etiopio; verŝajne, ĝi estas la sola lando en la mondo, kie ne jam ekzistas eĉ unu esperantisto. Ĉu la vigla kaj sana impeto de la nuna Egipta Esperanto-Movado rifuzos la honoran taskon forigi tiun mankon? Nu, mi simple demandas kaj marŝas antaŭen. De la piramidoj mi venas al la gigantaj nubskrapantoj de Novjorko. AMERIKA ESPERANTISTO estas lukse broŝurita gazeto, kiel decas al ambasadoro de riĉa nacio. Krom oportunaj kaj trafaj artikoloj en angla lingvo, oni legas kun aparta plezuro la personajn travivaĵojn, kiujn spertis dum ĵusa vojaĝo la konata nederlanda samideanino Julia Isbrücker. Si finas sian priskribon jene: «Generala penso estas, ke en Ameriko oni tute ne povas senti la bezonon de internacia ligvo, sed kiam mi diris tion al iu amerikano, li respondis: Kompreneble, la amerikanoj sentas simpation por Esperanto, ĉar ili malŝategas lerni lingvojn, kaj ili vidas en Esperanto facilan ilon por transsalti ĉiujn aliajn lingvojn, por povi atingi la tutan mondon. Jen esperiga fakto!».

LA JUNA VIVO, eterne freŝa gazeteto por la junularo, prezentas siajn lerte arangîtajn sekciojn, inter kiuj plej karakteriza estas la Skolta Rubriko, kie oni klarigas la disvolviĝon de nia lingvo tra la vicoj de la tutmonda skoltaro. MONDA TRIBUNO estas ampleksa gazeto el Vieno, kun aspekto de taĝurnalo. Ĝi estas amuza, kultura periodaĵo en Esperanto, sed oni uzas la lingvon tute ne menciante ĝin; kelkaj el ĝiaj artikoloj kun abundaj ilustroj estas vere interesaj por la ĝenerala publiko. INTERNACIA KULTURO daŭrigas sukcese sian planon: abundaj desegnaĵoj kaj artaj fotografaĵoj kun gravaj artikoloj pri literaturo. SENNACIULO aperas kun siaj kutimaj artikoloj pri ekonomio kaj filozofio. Oni informas detale pri la proksima Kongreso, kiu okazos en Parizo.

Kaj, antaŭ ol fini, mi volas ankoraŭ prezenti el Danlando originalan presaĵon NESKA, kurioza anagramo el la unuaj literoj de jena frazo: Ni Estas Samideanoj Kaj Amikoj. Niaj baskaj amikoj miros pri la koincido de tiu nomo kun tiu de la vorto «knabino» en baska lingvo! Senpretendema celo de tiu simpatia dana kolegeto estas peradi adresojn de korespondemuloj. En tiu-ĉi unua numero, ĝi dediĉas apartan atenton al la japanaj amikoj, kiuj avide deziras havi rilatojn kun eŭropanoj. Por iel helpi ilin, en aparta listo, mi zorgos aperigi kelkajn adresojn. Sen io jam pli por diri, mi salutas vin forirante por ripozi kaj mediti en la paco de apudmara ĝardeneto.

LA LEGEMA KOBOLDETO

Meze kaj dise, tra la vasta maro de la esperantismo, aperas ĉi tie kaj tie la strangaj insuloj de la izolaj esperantistoj. Ne temas nur pri tiuj samideanoj, kiuj provizore oficas ekster sia kutima restadejo, sed ankaŭ pri daŭraj loĝantoj, membroj de Asocioj kaj aktivaj klientoj en la koresponda fako de plej diversaj gazetoj. Ili estas homoj, do, kiuj uzas nian lingvon kaj profitas sian tempon, verŝajne, por svingi, antaŭ la gapaj okuloj de la lokaj indiĝenoj, la privilegion, kiun ili ĝuas posedante *facilan* kaj *universalan* lingvon. Nomoj kaj nomoj de urboj, en malproksimaj kaj... en ne malproksimaj landoj, estas garnitaj, dum jaroj, per la sola adreso de unu sola esperantisto. Ofte, la morto, la vivo mem aŭ la negocoj forviŝas subite lian nomon el la jarlibroj, forviŝante samtempe la nomon ankaŭ de tiu urbo, kie li dum jaroj ne povis... aŭ ne volis varbi al nia afero la nomon de eĉ unu sola alia persono

FACETAS DEL MOVIMIENTO ESPERANTISTA

● ESPAÑA.—BARCELONA: Aumenta el número de antiguos esperantistas que se adhieren a nuestra Federación. A ella se suman muchos nuevos elementos.

En el Salón Rosa, del Paseo de Gracia, se reune el primer miércoles de cada mes un grupo de buenos esperantistas que recibe con placer a los esperantistas que visitan Barcelona.

En Zaragoza, Tarrasa y Valencia, se dan cursos para principiantes y de perfeccionamiento, predominando entre los alumnos el elemento juvenil.

En Valencia, los Dres. Tudela y Herrero siguen dando un curso para médicos y estudiantes de Medicina con evidente aprovechamiento.

● ITALIA.—La conocida Revista «Giornale de Clinica Médica» publica todos sus artículos en lengua italiana y en Esperanto.

El Touring Club de Italia, por iniciativa de la Federación Esperantista Italiana, aceptó proponer a la Alianza Internacional del Turismo el uso práctico del Esperanto para todos los asociados.

● AUSTRIA.—El Gobierno de Stiria ha acordado subvencionar con 3.000 chelines austriacos el Congreso Esperantista Austriaco, que se ha de verificar en Graz.

El día 21 de Mayo, se podrá oir la voz del Dr. Kare Dworschak, Director General de Comunicaciones en Austria, por Radio Viena. Nuestro eminente samideano hablará en Esperanto con motivo de la edición de nuevos sellos de Correos con texto en Esperanto. Tanto la alocución como la mentada edición constituyen una valiosa propaganda.

La tercera reunión de ferroviarios esperantistas tuvo lugar en Viena del 1 al 3 de Abril. En ella tomaron parte el Director General de Ferrocarriles, Dr. Seidler, el Director General de Comunicaciones Dr. Dworschak, el Presidente del Sindicato Ferroviario de Austria y diputado, Freund; el Secretario General de Ferrocarriles Dr. Dantine y varios eminentes ferroviarios de otros países. Asistieron nutridas representaciones de ferroviarios de Francia, Holanda, Italia, Dinamarca y Suiza. Se tomaron importantes acuerdos y, entre ellos, el de fomentar el Esperanto entre los ferroviarios del mundo entero.

● ALEMANIA.—La Feria Internacional de Frankfurt ha tenido lugar en el pasado mes de Abril. En ella ha funcionado un servicio permanente de intérprete esperantista. Para el próximo otoño el Esperanto tendrá «stand» propio.

La conocida firma cinematográfica «Alfa» ha adquirido los derechos para filmar todas las obras del famoso poeta y dibujante humorista Wilhelm Bush. ¡La sincronización se hará tan sólo en Esperanto! La primera película será «Las Aventuras de un Mozo» y estará lista para el próximo Agosto.

● DINAMARCA.—Durante el invierno, en todas las ciudades danesas se dan cursos de Esperanto; en Fredericia se dan cinco cursos con un total de 140 alumnos.

● HOLANDA.—La escuela preparatoria Normal, en Haarlem, ha dado cursos de Esperanto para estudiantes del Magisterio. Ha sido luego imitada por la Escuela de Hengel y también por la de Deventer.

Gran éxito tuvo en Haarlem el 16.º Congreso de la Asociación Esperantista Holandesa (LEEN), que ha sido llamado «El Congreso entre flores», por tener lugar en la época en que los tulipanes dan al paisaje bátavo su aspecto encantador. En él se puso de relieve la importancia del Esperanto en la vida holandesa.

Al mismo tiempo, tuvo lugar en Utrecht el Congreso de F. L. E., o sea, de obreros esperantistas, en el que se demostró la creciente pujanza de nuestra idioma entre las clases trabajadoras del país.

La Asociación de Científicos Holandeses Esperantistas (A.N.S.E) ha conseguido que la revista dental «Tijdschrift voor Tandheelkunde» publique resumen de sus artículos en Esperanto, además del francés, inglés y alemán. Ya son varias las revistas científicas que usan el Esperanto para resumir sus artículos, y es deseable que cunda el ejemplo, en beneficio también de una mayor difusión de dichas revistas.

La Asociación Cultural «Vereeniging voor Volksonderwijs», que cuenta 125.000 miembros, ha decidido unánimemente pedir al Gobierno holandés que declare el Esperanto como estudio facultativo en las escuelas públicas.

● FINLANDIA.—El ministro del Trabajo de Finlandia es la antigua esperantista y delegada de U. E. A., en Helsinki, Srta. Tyyne Leivo Larsson.

● COREA.—En Seúl, capital de Corea, hay un millar de esperantistas en las dos Sociedades allí existentes. El Esperanto adquiere gran desarrollo, por preferirlo al japonés, por rivalidad, y al inglés, por dificultad.

● FRANCIA.—En la industrial ciudad de Commentry se rotuló, el 13 de Marzo pasado, una calle con el nombre de Zamenhof.

Ello indica el grado de entusiasmo y decisión del grupo, muy numeroso, de esperantistas en dicha ciudad.

La Unión Esperantista Francesa tiene un Servicio de Turismo por medio del Esperanto. Este servicio no es comercial y sólo cobra los gastos de administración. Desde ahora se cuida de organizar jiras muy atractivas.

● ESTADOS UNIDOS.—La Institución de Altos Estudios del Estado de Oregón ha iniciado un curso por correspondencia con éxito más que halagüeño.

● POLONIA.—Los escolares de ocho escuelas de Cracovia han estado estudiando Esperanto durante todo el año escolar y han demostrado en los exámenes haber asimilado la enseñanza mucho mejor que la de otros idiomas.

¡CHOCANTE!

El **Daily Herald** publicó hace poco la siguiente anécdota, ocurrida en Ginebra.

En esta ciudad se celebraba un congreso «Pro Libertad de Prensa». Aunque duró tres semanas, uno de los delegados, a pesar de haber avisado su llegada no tomó parte en una sola sesión; se le buscó por toda la ciudad infructuosamente; por fin, se le encontró tomando parte en un congreso completamente ajeno al suyo, que se reunía en un edificio adjunto a éste. El delegado había asistido a todas las sesiones de dicho Congreso, en la creencia de que había ayudado con ello al objetivo de su Congreso, pues ignoraba los idiomas empleados en aquél, al cual había asistido.

La anécdota, que si no es cierta es muy verosímil, refleja fielmente lo que suele ocurrir, en la mayoría de los congresos internacionales, a donde acuden muchos congresistas porque «creen» que van a comprender algo, y cuando vuelven a su país de origen ocultan la verdad, esto es, que sólo han atisbado algo y comprendido muy poco de todo lo tratado.

Es deseo nuestro muy sincero, varias veces expresado, de que este BOLETÍN sea un auténtico portavoz de todos los esperantistas españoles. Con la mejor voluntad posible, procuramos darle interés y amenidad, para que su visita sea grata en todos aquellos hogares donde el Esperanto es conocido y apreciado. Queremos suponer, con la ilusión de estar en lo cierto, de que cada uno de nuestros lectores no es simplemente un abonado mas, sinó un fervoroso y activo paladin en la noble tarea de ayudar a la difusión de nuestro idioma auxiliar, aclarando los erroneos conceptos y las erroneas interpretaciones que acerca del mismo puedan hacerse, por malicia o por ingnorancia. La mejor garantia para el éxito de tan meritoria labor está en la existencia de nuestra Federación y en la puntual aparición de este BOLETIN, el cual, con toda su modestia, cumple ya su doble misión de ser, dentro de casa, el lazo cordial que nos une y fuera de ella, la airosa bandera que nos representa. Tenemos —¡los españoles somos asi! — ambiciosos proyectos: aumentar sus páginas, para ampliar sus secciones; hacer mas bella y atractiva su presentación, con dibujos y fotografias; editar de vez en cuando un suplemento con trabajos inéditos de indudable mérito literario o cientifico, a fin de que dicho material sea, en manos de nuestros amigos, un argumento convincente. Pero. . . este afan nuestro no debe ser aprobado con la fria aprobación que el silencio representa, sinó confirmado de manera más efusiva con sugerencias y consejos, además de rubricarlo con el gesto positivo de un aumento voluntario y generoso en las aportaciones económicas.

La mejor manera de favorecer al Esperanto en España es inscribiéndose en HISPANA ESPERANTO-FEDERACIO

Socio de número ...	13	ptas. anuales
Socio abonado.. ...	25	» »
Socio protector... ...	50	» »

Las dos últimas categorías dan derecho a la recepción de nuestro «Boletín».

LONGBARBA KONFUZO

Mia najbaro Paŭlo Timeget vivis feliĉe ĝis kiam, pro hepata malsano, li vizitis la preskaŭ tutan kuracistaron de la urbo. Ĉiuj konsultitaj specialistoj konsilis la samon: Operacio!!

De tiam, mia najbaro tute ne dormis. Strangaj fantomoj blanke vestitaj kaj maskitaj, svingante terurajn mortigilojn, persekutis lin senĉese, devigante lin kuradi, kuradi... ĝis kiam, ŝvitante malvarme kaj skuita de angora premo, li ekvekiĝis. Tamen, la hepata doloro tiom avizis lin pri la minacanta danĝero, indikita de la kuracistoj, ke finfine li akceptis, malbonvole, viziti la faman doktoron Ciontranĉul. Tiu laste konsultata specialisto estis granda, impona viro, kun longa, neĝoblanka, ornamplena barbo. Li estis, krom tio, afablega persono, kies konsiloj tiom efikis por la trankvileco de lia klientaro, ke ĉiuj iris sur la kirurgtablon tute trankviligitaj de liaj promesoj kun la aplombo de longa sperto.

Tio ankaŭ okazis al mia najbaro; malgraŭ sia malfido kaj teruro, li ricevis tiom da sekureco pri la majstreco de sia operacionto, ke li supreniris, mirinde trankvila, la kirurgtablon. La narkoto tre bone efikis, kaj Paŭlo perdis iom post iom la konscion, kaj ne plu vidis la blankan barbon de la impona Ciontranĉul. Post nedifinita tempo, la konscio revenis iom post iom al la menso de Paŭlo; denove la blanka barbo aperis antaŭ liaj okuloj. Dankeme, la malsanulo diris: «Dankon, doktoro! Vi pravis! Mi neniom suferis!» Tiam, nekonata, eksterordinara voĉo akompanante la blankan barbon diris al ĵusa operaciito: «Vi eraras, forpasinto! Mi ne estas la doktoro; mi estas... Sankta Petro, la ĉiela pordisto!».

ANONCETOJ

Ni akceptas anoncetojn kiuj rilatos al nia afero. Unu peseto au unu r-k. validas por du vortoj. Tri mallongigaj literoj valoras kiel unu vorto.

DR. HERRERO. Calvo Sotelo, 17. Valencia. Dez. koresp. kun Islando, Usono, kaj kun sefarditoj. Pri ĉ. t.

SR.º ERNESTO HURTADO, lignokomercista oficisto, dez. koresp. pri komercaj kaj merkataj lignotemoj kun samprofesiuloj el lignoeksportaj landoj. Camino Real de Madrid, 19, Valencia (Hispanio).

E. MARTINEZ. Generalísimo, 77. CHESTE (Valencia). Dez. komercajn rilatojn kun konstruistoj kaj arkitektoj en Anglio, Italio kaj Ameriko.

DR. E. TUDELA.—Ruzafa, 43. Valencia. Dez. koresp. kun ĉiulandanoj pri div. temoj. Respondo garantiata.

DENTTEKNIKISTOJ!—S.º Ricardo de Luna, dez koresp. pri metiaj k. ĝen. aferoj kun esterlandanoj. Paseo de Colón, 5, 1.º, 2.ª Barcelona (Hispanio).

SKRIBU AL JAPANIOJ

Jen la nomo de kelkaj gejunuloj, kiuj tre plaĉe korespondadus ankaŭ kun hispanaj gejunuloj:

S-ro Nagasu Kazujuki
S-ro Hanatani Ken
S-ro Oonisi Akira
S-ro Huzimoto Tosiaki
S-ro Kitahara Atujuki
S-ro Simizu Tosio
S-ro Jasuda Takatugu
F-ino Uemura Hisako
F-ino Eniti Sadako

Ilia komuna adreso estas: Abeno-Kotogakko, Kitabake, Abeneku, OSAKA-SI, Japanio.